

jen: gravaj dokumentoj, pri verdaj rezultoj, okazajhoj kaj la rilato inter la Verdaj Partioj kaj Esperanto.

### Verdaj Partioj kaj aliaj kiuj uzas Esperanton

**Verda Nova Konsento** (Green New Deal), nun en 4 lingvoj.

Postuloj kaj ekzemploj por daŭropova politiko: (de, en, fr, pl) <http://greennewdeal.eu>

Tie diversaj rilataj dokumentoj en pluraj aliaj lingvoj: [gef.eu/publications/publications-in-other-languages/](http://gef.eu/publications/publications-in-other-languages/)

Kaj jen versio de 2009 en Esperanto: [http://www.verduloj.org/EG\\_Manif\\_eo.pdf](http://www.verduloj.org/EG_Manif_eo.pdf)

2012 La **Tutmonda Charto de la Verdaj Partioj** estis amendita en ilia Kongreso en Dakar.

Origine ghi estis decidita en Canberra, 2001, kaj tradukita en Esperanton; sed ankoraŭ nur tiu de 2001 troviĝas sur ilia retejo:

Sur la AVE-retejo: <http://www.verduloj.org> > Verdaj Partioj

2012-04: Kaj jen instiga alineo en la **Deklaracio de Dakar - Global Greens pri siaj estonta funkciado:**  
(en) 2.6 On a more practical level **it remains difficult** to organise coordination meetings and exchange information **due to** time -zones and **language problems**

(eo) 2.6 Montrighis praktikaj malfacilajhoj organizi kunordigajn renkontighojn kaj intershanghi informojn pro la globalaj tempo-zonoj kaj **lingvaj problemoj**.

**EEU** Europa Esperanto-Unio (EEU), Avenue Louise 405, bte 9, BE-1050 Bruselo

[eeu@europo.eu](mailto:eeu@europo.eu) , <http://www.europo.eu/en/chefpagho>

### Pirato-Partio

Ene de la nova Piratopartio <http://www.piratopartio.org> komencighis Esperanto-grupo.

Ĉar Piratoj el Svedio estas kun 2 parlamentanoj en la komuna frakcio Verduloj & Regionalistoj & Piratoj (Greens /EFA) de la Europa Parlamento,

### Raportoj pri la AVE-agado:

**2012-03-27/29 Dakaro** (Senegalio), Tutmonda Kongreso de la Verda Junularo:

AVE partoprenis kaj estis kore invitita al la (malgranda) Junula Kongreso kaj rajtas havi inform-standon.

AVE intencas prezenti la temon lingva justeco pere de Esperanto.

[www.globalyounggreens.org](http://www.globalyounggreens.org)

**2012-03-29/04-01, Dakaro** (Senegalio), Tutmonda Verda Kongreso. <http://www.dakar2012.org>

<http://www.globalgreens.org>

Ekologia kaj Demokrata Partio de Senegalio: <http://www.fedesecolos.com/>

AVE kutime partoprenis la Tutmondajn Kongresojn de la Verdaj Partioj (en Canberra 2001 kaj Sao Paulo 2008) Green European Foundation / Europa Fonduso de la Verduloj: GEF kolektas informojn, subtenas la varbadon kaj organizas seminariojn. <http://www.gef.eu/>

La raporto troviĝas sur la retejo de AVE: [verduloj.org](http://www.verduloj.org)

2012-07-28/08-04 Grezijono: Raporto:

### Alternativa Semajno kun verd-politika seminario de AVE

Dum tiu semajno okazis 2 niveloj da lingvokursoj, amendita per kantado kaj skechoj.

Kadre de la Verd-Politika Seminario de AVE partoprenis inter 6-10 homoj.

Ni diskutis ekologiajn kaj demokratiajn temojn:

- 9 Diversaj argumento-kampoj kontraŭ la atomenergio (mw)\*1
- Klimatoshanghigho kaj la oceanoj (mvh) \*2
- Plastajhoj kaj la akvo - videblaj kaj ne-tuj-videblaj konsekvencoj (mw)\*3
- Urboj por shanghi la mondon (mtl)\*4
- La ekonomiaj krizoj kaj kiel eviti ilin (ml)\*5
- AVE, Asocio de Verduloj Esperantistaj (mw) <http://www.verduloj.org>

- EDE (emanuel) <http://www.e-d-e.org/>
- Piratpartio, Flua demokratio kaj aliaj temoj (mvh)\*6
- Ekologia Glosaro \*7

Bonvolu rigardi la programon tie: <http://gresillon.org/s2>

\*1) Detalojn kaj ligojn al la koncernaj dokumentoj vi trovas en <http://www.verduloj.org/energio.htm> (sub "100 Argumentoj ...")

\*2) Marco van Hulsten klarigis la influon de la oceanoj al la tutmonda klimato; kaj rakontis pri eksperimento fekundigi la oceanon per fero por ke pli da organismoj povus vivi tie, kun la dezirata konsekvenco ke ili kaptos karbondioksidon - por redukti la forcejan efikon. Evidente tiu eksperimento montris tro kompleksan rezulton. Pro tio ghi kaj aliaj geo-ingenieradaj planoj povas havi negativajn konsekvencojn.

\*3) Prelego pri plastajhoj: <http://www.verduloj.org/dokument.htm> (sub "Ekologio, Sano, Kemio")

\*4) Marie-Therese Lloancy prezentis la libron de André Cazetian "Urboj por shanghi la mondon", kion shi tradukis en Esperanton. La aŭtoro estis urbestro de Mourenx Nova-Urbo (fondita 1956). Unue li priskribas la mastrumadon de tiu ek-funkcia urbo (pro ekspluato da tergaso) en rekta kunlaboro kun la novaj enloĝantoj, sendepende de ilia nacieco. Due li priskribas la kondiĉojn por Partoprena Demokratio kiu nepre necesas por atingi socialan kunvivadan pacon kaj ankaŭ ekologian daŭropovecon, kontraste al la tendencoj de la nov-liberalismo, kies sola celo estas la maksimuma profito. Ghi estas tre bone legebla. 106 p. A4, 2 bildoj, prezo 15 Euro, ISBN 978-2-35519-109-1

\*5) Michael Leibman prelegis en 3 sesioj pri la ekonomiaj principoj kaj krizoj de la lastaj du jarcentoj; kaj prezentis kiel alternativon la Verdan Novan Konsenton "Green New Deal": strebi ne al daŭra kreskado, sed al pli stabile balancita ekonomio, kie tamen evoluo povos ekflori. La homa populacio povas esti stabila se ĉiuj homoj spertas socialan egalecon t.s. kiam la diferenco inter la plej riĉaj kaj malriĉaj estas malgranda.

\*6) Marco van Hulsten informis pri la programo Liquid-Feedback kion uzas la Piratpartio por rekte ligi la volon de la civitanoj kun la faro de la de ili delegitoj; pli en Esperanto: <http://piratpartio.org>

\*7) Ni diskutis pri diversaj terminoj aŭ vort-alternativoj kun la celo klare distingi inter diversaj nocioj & aferoj, do eviti ambiguecon, observante la komunan uzon - ekz-e:

- povo & potenco
- liven (anstataŭ maldekstren, aparte tauge ekz-e je biciklado)
- kush-biciklo (sur kiu oni plie kushas ol sidas)
- ghendra egaleco (anstataŭ gea egaleco), kiam temas pri la seksoj en la socialaj aferoj
- -enz- pseudosufikso en PMG (sufikso kiu anstataŭas -il- (aŭ -izil-) aplikado da substancoj aŭ kemiaĵoj)

## Renkontighi kun la Verdaj Partioj

**Tutmondaj Junaj Verduloj:** <http://www.globalyounggreens.org/wordpress/>

2013 Vizito de interesuloj en la Europa Parlamento ??

Mi vidis, ke Heide Ruehle, MEP, invitis el sia regiono homojn al 3 taga vizito; shi informis, ke nun eblas alighi al vizit-grupoj pere de tiu retejo: <http://www.europarl.europa.eu/visiting/de>

La Europarlamentanoj rajtas gastigi unu- aŭ du-foje jare grupon da vizitantoj por konatigi ilin kun sia laboro en la EP kaj de la EU-sistemo ĝenerale.

Mia ideo estis:

Peti la Verdan Frakcion al invito de AVE-anoj el ĉiuj EU-landoj viziti la European Parlamenton en Bruselo:

Nia lingvo estu Esperanto, kaj ni mendus tradukiston por ke ĉiuj komprenu la aferojn. Mi esperas ke ni ricevus vojaĝkosto-subtenon - almenaŭ la duonon de la kostoj. Mi esperas ke sufiĉe multaj esperanto-parolantaj AVE-anoj interesighos (inter 10 – 30). Kompreneble ni ne povos elekti la daton, eble diri kion ni preferos - printempon 2013. La sekva balotado por la EP estos en 2014 (se mi ne eraras).

Bedaurinde - intertempe interesighis nur malmultaj, kaj tio ne sufiĉas por peti inviton - eble EEU povas aranĝi tian pli efike.

**2013-03 Vintra Tendumado en Finnlando - europaj kaj tutmondaj Junaj Verduloj:**

Oni devus alighi rapide (la unua dato jam forpasis): [micha@fyeg.org](mailto:micha@fyeg.org)

<http://www.fyeg.org>

**2017:** Kongreso de la Globalaj Verduloj en Europo antaŭvidita por 2017.  
Jen la centra labor-posteno por tiu estonta tutmonda verdpartista evento, kun sidejo en la oficejo de la Europa Verda Partio en Bruselo: <http://europeangreens.eu/vacancies>

2012-05-11/13 **Kopenhago, Konsilio de la Europa Verda Partio**

<http://copenhagen.eu.fuzion.co.nz/>

Ni estas invitataj partopreni, almenaŭ per inform-stando - ĉu iu el vi - ĉu vi havas tempon kaj emon ?  
Ni povus montri i.a. la Kontribuon "diskuti la lingvan justecon ene de la verdaj partioj", verkita de francaj verduloj. Ĉi-foje ni devis rezigni pro manko da aktivuloj.

### **Informiloj de Verdaj Partioj & aliaj**

**Europa Civitana Iniciativo**, elektu vian lingvon: <http://ec.europa.eu/citizens-initiative/public/welcome>  
Bedaurinde oni malakceptis la ECI-on de EEU pri la Europa Himno: uzi la tekston en Esperanto por kanti en neutrala lingvo.

Germanaj Verduloj pri la **estonteco de la EU** - jen debato-pagharo.

Ĉu ni - germanaj Verduloj - enmetu proponon pri Esperanto ?

Ghi tushas i.a. la financojn, ĉar la giganta tradukmashinaro de EP & EU kostas multe da mono, kaj tamen kreas malegalecon inter diversaj lingvo-grupoj:

<http://www.gruenes-blog.de/zukunftdereu/>

2012-07 **Verda Partio de Europo** publikas en nova ĵurnalo - ekz-e pri Rio+20:

<http://www.greeneuropeanjournal.eu/>

GEF - **Verda Europa Fonduso**, la bazo por eduki, informighi kaj diskuti de la Europaj Verdaj Partioj ofertas diversajn okazajhojn. Kutime la laborlingvo estas la angla - se pluraj el ni volas (kunlabori) ni povus eble uzi ankaŭ al Esperanto. GEF ankaŭ kun-organizas Verdajn Somerajn Universitatojn en diversaj europaj landoj. Eble AVE povus partopreni en 2013 je kelkaj ?

<http://www.gef.eu>

Jen la ret-ligo al la **verdpartista baloto-rezultoj en Europo**:

<http://europeangreens.eu/menu/elections/election-results/>

2012-10 La **Verda Partio en Chehio** denove eniris en la parlamenton - gratulon !

2012-12 **Albanaj Junaj Verduloj** plantis arbojn en Fushe-Kruja kune kun iu CSO pri verdigo de la Balkan-regiono. Ĉar en Albanio okazas amasa forhakado da arboj kaj la registaro au urb-estroj ne zorgas por replanti arbojn. Tio kausas poluadon de la aero, erozion kaj detruas la ekosistemon kiu estas la vivbazo por multaj specioj. Planti arbojn en la urboj plibonigas la atmosferon tie, donas ombbron kaj subtenas birdojn, abelojn kaj diversajn insektojn. De la Federacio de Junaj Europaj Verduloj:

<http://www.fyeg.org/main/index.php/news/mo-news/483-albanianyongreensplantnewtrees>

2012-11-26 **Tajvana staghulino** en la Europa Verda Partio - intershangho da spertoj.

Jen la blogoj de CHIU Hsin-Hui: <http://europeangreens.eu/blogs/hsin-huichiu>

2012-11-26 **Katalunaj Verduloj** estis elektitaj al 10 el 135 seĝoj en la Parlamento, el la 4 provincoj.

2012-11-25 **Yesiller Ve Sol Gelecek** (Verduloj kaj Maldekstra Estonteco) estighis el du partioj (Yesiller Partisi) kaj (Eşitlik ve Demokrasi Partisi). La fondigho-kongreson partoprenis Monica Frassoni (EGP), Helene Flautre (MEP). kaj Cem Özdemir (vira ĉefo de la germanaj Verduloj). pli pri tio: (en la angla) <http://europeangreens.eu/news/founding-congress-%E2%80%9CYesiller-ve-sol-gelecek%E2%80%9D-party-turkey>

**Verda Partio en Finnlando:** Vihreä Liitto (Verda Ligo) sukcesis en elektoj por lokaj konsilioj averaghe je 8,3%. Ili estas la dua partio en Helsinko. En mia urbo, Orimattila, ili estas 5a kun unu nova delegitino, Saara Paajanen. (dankon al Börje)

2012-11: **Verda Partio en Kroatio** preparas al lokaj elektoj, kaj eble al kunlaboro kun aliaj.

Litovio: Verda Partio denove en la Parlamento: Linas Balsys, kiu tre aktivis **kontraŭ nova atomreaktoroj en Litovio**. pli:

<http://europeangreens.us2.list-manage2.com/track/click?u=823d8d6ab731c7b48a1ee517d&id=45e198c208&e=bb8b45cf99>

2012-08 **Verda Partio en Senegal: FEDES**

<http://www.fedesecolos.com/>

Rimarko: FEDES kunlaboras kun la naturmedia CSO en Dakar, Oceanium: <http://oceanium.blogspot.de/>

Jen la Deklaro de Dakar en Esperanto: [http://www.verduloj.org/FEDES\\_ghenerale.rtf](http://www.verduloj.org/FEDES_ghenerale.rtf)

(dank' al Antoine, kiu kun du aliaj esperantistoj partoprenis la Globalan Verdpartian Kongreson tie)

2012-07: **Usona Verda Partio elektis Jill Stein** kiel kandidatino por la prezidento. Kvankam la usona sistemo fokusigas nur al la du grandaj partioj, demokratio postulas plian elekton. aparte ĉar ankaŭ Obama ne sufiĉe okupiĝas pri ekologio kaj daurigas la militistan vojon.

2012-07-09 **Gratulon al la Verduloj en:**

+ Francio kiuj nun havas 18 seĝojn en la parlamento (antaŭe estis 4) .

+ Germanio, kie post novaj balotoj nun 'Verduloj kun Socidemokratoj regas en 3 landoj:

Baden-Virtembergo, Nordrejn-Vestfalio, Shlesvig-Holstejnio.

+ Romanio, kie Verduloj sukcesis eniri en la landan parlamenton.

2012-05-07 Verda Partio en Grekio, **Oikologoj Prasinoj**, plibonigis sian rezulton kompare al 2009, sed mankis kelkaj mil voĉoj por superi la 3%an sojlon. Nikos Chrysegelos, MEP, diris, ke ne indas malesperi, ĉar ili havas taŭgajn respondojn por la krizo. Se Grekio ne sukcesos krei registaron, denova baloto okazos en Junio; kaj OP partoprenos.

Daniel Cohn-Bendit (verda MEP) konsilis ne forgesi la katastrofojn (ekz-e Versailles & naziisma-Germanio) kiuj povus sekvi el sen-alternativa troega fortranĉo da mono por Grekio. Necesas serioza dauripova sinteno de la administracio, kiu postulas investon en shtataj kontrolsistemoj por la impostoj kaj elspezoj; kaj aparte investi en dauripovecan infrastrukturon - aparte energio, ĉar Grekio importas multon, sed povus mem produkti suno kaj vento-energion.

2012-04: **Francio Prezidenta Elektro:** Eva Joly estis la kandidatino de la Verda Partio. Shi ricevis 2,2%. Shi luktis ene de ege polarizita etoso, kaj prezentis la Verdajn Novajn Kunsenton (Green New Deal) por Francio. Nun la Verduloj decidis subteni la socialisman kandidataton Hollande je la decida baloto je la venonta semajnfino.

2012-09 Intertempe Hollande estas prezidento, kaj kelkaj Verduloj kunlaboras en la registaro.

**2012: Verdaj Partioj en Kroatio**

Jen la koncizigita informo de Sinisha Dvornik: En Kroatio ekzistas 4 Verdaj Partioj kiuj devus kunlabori se ili volas havi pli bonajn sukcesojn en la tuta lando: Zeleni Hrvatske, Zelena Lista, Zeleni Stranka, Zeleni Zajedno: <http://www.zelenizajedno.hr>

En decembro 2011 estis balotado por parlamento de Kroatio. Niaj tri au kvar verdaj partioj havis malbonajn rezultoj - malpli ol 1 %, balotada sojlo estas 5 %. Je la 18a de Februaro renkontighis **Zeleni Stranka** kaj **Zeleni Zajedno** rilate kunlaboron.

**Zeleni Hrvatske** estas aktiva en urbo Osijek kaj la orienta parto de Kroatio.

Problemo: Ŝajnas ke por Zeleni Hrvatske verda politiko estas nur ekologio - participativa demokratio, sociala justeco kaj pacifismo tute ne gravas por ili. Tri jaroj antaŭe ili estis en antaŭbalota koalicio kun nacionalisma partio.

La kopezidantino de **Zelena Lista** (Verda Listo), Vlasta Toth, klare skribis ke ŝia partio ( fakte ŝi ) ne ŝatus kunlabori kun Zeleni Zajedno kaj Zelena Stranka. Zelena Lista estas aktiva en urboj Zagreb kaj Sisak. La partio vivas de pasinta gloro. En urbo Sisak ili "teknike subtenas" ankaŭ du nacionalismajn partiojn. (de kroata verdulino)

**Belgio:** La partio Groen (verda) iĝis sociale kaj ekologie interesa partio por laboristoj. La prezidanto estas viro kun ideoj kaj li ne timas peti konsilojn al la membroj de la partio. ( de Jakvo)

### Verda Politiko

La alia **hungara verda partio:** Lehet más a politika (politiko povas esti alie) protestas kontraŭ la nova mal-liberisma konstitucio: (hu) <http://Lehetmas.hu>

2012-09 nova franca prezidento Hollande volas **malhaltigi la malnovajn atomreaktorojn en Francio.** Por ni en sud-okcidenta Germanio tio signifus la finon de la 2 atom-reaktoroj de Fessenheim, la plej malnovaj de Francio, kiuj jam nun poluas nian aeron per radioaktivaj emisioj.

2012-11 **En-urba rapideco de 30 km/horo** - tiu nova Europa Civitana Iniciativo estas bonvenigata de la frakcio Verduloj/Regionalistoj/Piratoj en la Europa Parlamento (kiu jam en 2011 postulis tion).

2012-11 Europa Komisiono metas **ne-legale fishkaptantaj landojn** sur Nigran Liston: Raul Romeva (kataluna membro de la frakcio Verduloj/Regionalistoj/Piratoj en la Europa Parlamento), aktivas tie pri daŭropova fishkaptado. Kelkaj landoj ankoraŭ subtenas nelegalan, nereguligitan kaj neraportantan fishkaptadon: Belize, Kambogho, Fijhi-Insuloj, Guineo, Panamo, Sri Lanko, Togo kaj Vanuatu. Krom tio aliaj landoj ne sufiĉe gardas tiun problemon. Li diras: Se tiaj landoj ne plibonighos ili devas sperti mal-favorajn merkato-rilatojn kun la EU. (Raul Romeva, en la kataluna, kun anglaj resumoj) <http://blocs.mesvilaweb.cat/node/view/id/233858>

2012-10-17/21 **Sahel-Regiono, Nighera Verda Partio R.S. V Ni'ima**  
Ili klopodas re-verdigi la Sahel-zonon kaj protekti ankau la sovaghajn bestojn tie.  
En Niamey okazos kongreso de RSVNIIMA kaj tuj poste tiu de la Federacio de Afrikaj Verdaj Partioj.  
<http://www.rsvniima.org/> , (Dankon al Boukari Illiasou)

### Politiko Ghenerale

El analizo de nia filo pri la rilato inter la Verduloj kaj la nova partio Piratoj en Germanio\* sekvis la jena **Konsiloj por bona demokratia kunvivo inter partioj**

1. Ne diru ke la aliaj partioj ghenas la homojn je politika partopreno, sed la propra estas la unika pozitiva.
  2. Persone paroli kun membroj de aliaj partioj por intershanghi opiniojn.
  3. Ne opiniu, ke la aliaj partioj havas fiajn motivojn. Kontraue - kedu ke aktivi en iaj partioj estas bona.
  4. Realisma kritiko necesas. Ghi devas veni el la propra perspektivo: "mi opinias, ..."
  5. Resti serena ech kiam venas nova konkurenca partio (nun la Piratoj); ne kalumniu ilin.
  6. Mem klopodi esti bona Verdulo (au ali-partiano); esti autentika, kompetenta kaj tiamaniere kredinda. (lau Katja Husen en fb, 2012 - iomete koncizigita de AVE/mw)
- \*) <http://blog.till-westermayer.de/index.php/2012/04/03/die-hoflichkeit-der-parteien/#more-3539>

----- AVE -----

#### Financoj de AVE:

Por nia partopreno je la **Globala Junulara Verda Kongreso en Dakar** ni elspezis 618 Euroj: (donaco al la organizantoj: 100, 3\*kotizo: 270, libroj senditaj de UEA: 98, poshmono por la 3 deĵorantoj: 150). **Ni dankas kore al la Fondajho Esperanto Internacia, kiu transprenis 235 Euroj.**  
<http://www.stiftung-mondo.de/mondo/esperantointernacia/eo-int.htm>

Kaj mi dankas kore al tiuj kiuj sekvis mian peton kaj jam pagis sian jaran AVE-kotizon (5 Euroj) kaj pluraj ech iom pli. Mi komprenas ke la jara komenco chiam tre strechas niajn privatajn financojn.

La konto de AVE che UEA: avex-z.

Konto de UEA: IBAN: NL72INGB0000378964, BIC: INGBNL2A

Bonvolu noti: " ' via nomo' por Kto. avex-z"

--- fino ---